



Boletín

n° 398 aprilo - junio 2012



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
Aperanta de 1949
Numero 398

Redakto-skipo

Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos López

Revizio: Jesús García Cano, Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:

bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: 0182-1252-31-020401-961

Telefono: (34) 914468079 (bv. Lasi mesaĝon en la aŭtomata respondilo)

Poŝtelefono: 638-547-104

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Félix M. Jiménez

Kasisto: Raúl Mtnez. Anguita

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

Juan José Vera

Jesús García Cano

Salutvortoj

Karaj gesamideanoj kaj legantoj de Boletín. Kun granda ĝojo kaj plezuro, mi salutas vin kiel nova vicprezidanto de HEF. Mi neniam imagis atingi tiel alt-rangan postenon, ĉar multaj el vi scias ke mi estas prezidanto de AEU krom redaktaro de *Monate ĉe Vi*, (bulteno de nia asocio), kaj mi opinias ke tri postenoj estas tro da laboro, tamen mi akceptis ĝin ĉar mi emeritiĝas kaj mi havos sufcian tempon, ne nur por ripozado, sed por aktive labori por la Movado, kaj partoprenado kaj kunlaborado kun la Federacio estas tre bona sperto, kiun mi profitos por malkovri novajn ideojn kaj alporti la miajn. Mia tasko estas vere interesa ĉar mi devas prizorgi la staton de la asocioj kaj rilatoj kun la asociaj membroj, varbado, k.t.p. tio signifas ke mi ofte kontaktos kun ĉiuj asocioj aliĝintaj al HEF kaj mi klopodos iamaniere informi pri ĉiu afero kaj admoni, se necese, por la bona marŝo de la movado. La pasintan dimanĉon 13-an de majo, mi partoprenis pere de skajpo, la unuan Ĝeneralan Kunvenon kun la estraro, kaj de tiam mi pretas fari mian laboron. De antaŭlonge pro diversaj kaj ne menciindaj aferoj, mi ne ĉeestis la hispanajn kongresojn, kaj nun mi bedaŭras tion, ĉar la etoso kaj kunvivado kiun mi spertis en Almagro, estas neforgesebla kaj tre pozitiva kaj mi esperas kaj deziras ĉiam partopreni kaj ĝui la realan etoson de la vera Esperanto-sento, ĉar nia celo estas devastigi la lingvon kiel ponto de amikeco, frateco kaj solidareco inter la homaro. Kalkulu kun mi kiel kunlaboranto de nia Movado en Hispanio.

Ángel Arquillos

Vicprezidanto de HEF


Presejo: Gráficas Aurora, Zaragoza
DL-Z-334-90

ENHAVO

Ordinara Ĝeneral Kunveno	3
Gazetara Agado	6
Esperanto en la Nacia Biblioteko	8
Esperanto en teknika komitato de ISO en Madrido	9
Raporto pri la 71a Hispana Kongreso de Esperanto Almagro	14
Raporto pri Itala Kongreso de Esperanto en Sicilujo	16
La katalogo de Biblioteko Molera enretigita	18
Vivu la teatro! (I)	20
Pri grupoj kaj asocioj	24
La angla, ĉu lingvo aŭ varo?	26
Lokaj lingvoj, tutteraj lingvoj	28
Funebre	29
Informo pri la Hispana Esperanto Kongreso en Zaragogo 2013	31

Kovrilo: Komuna foto Kongreso de Almagro. Aŭtoro. Mariló Torres Mateos

Noto:



Ángel Arquillos

Estas plezuro por mi repreni la taskon pri nia bulteno, bedaŭrinde pro familiaj problemoj de la iama redaktoro Juanjo, problemoj, kiuj devigis al li ne plu eldoni Boletín. Ni esperas kaj deziras ke ĉio solviĝos kiel eble plej baldaŭ. Al ĉiuj legantoj, la redakcio petas senkulpigojn pro tiu neatendita afero, kiun, ni esperas ne ripetiĝos denove. Ni laboras por redakti la sekvan bultenon kiel eble plej rapide, por repreni la tutajn temojn, kiuj okazis lastatempe. Kompreneble, ĉi numero "*aprilo-junio*" alvenas ĉe vi en oktobro. Ni klopodos aperigi la sekvan en novembro aŭ komence de decembro kaj pro tio ni aktive laboras.

Partoprenu en la vivo de la asocio, pere de la retaj forumoj mastrumataj de HEF:

La listo HEF-anaro taŭgas por ĉiuj informoj kaj diskutoj rekte ligitaj al HEF; se vi ankoraŭ ne estas membro, vi povas aliĝi sendante mesaĝon al hef-anaro-subscribe@yahoo.com

La listo HEFaktivado taŭgas por kunordigi agadojn rilatajn al nia movado kaj asocio. Eblas aliĝi per mesaĝo al hefaktivado-subscribe@yahoo.com

ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 29an de aprilo 2012 je la 10:00 horo (dua alvoko) okazis la Ordinara Ĝenerala Kunveno en la Palaco “Condes de Valparaíso” (strato Bernardas, 2) de Almagro, provinco Reĝurbo. Ĉeestis la tuta estraro: la voĉdonantoj Juan Trenado, Eduardo Berdor kaj Miguel Hernández, la kasisto Raúl J. Martínez, la Sekretario Félix Manuel Jiménez, La vicprezidanto Miguel Gutiérrez kaj la Prezidanto José A. del Barrio, kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ 36 individuaj anoj kaj 9 kolektivaj membroj (Fratego, Kantabra E-Asocio, Kultura Asocio Esperantista, Bilbao Esperanto Grupo, Valencia E-Grupo, Andaluzia E-Uinuiĝo, E-Kastil-Maĉo Asocio kaj Madrida E-liceo) reprezentataj de naŭ el la ĉeestantaj individuaj membroj, entute 51 partoprenantoj. La sesio disvolvigis laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (julio 2011).

Oni aprobis unuanimece la protokolon de la antaŭa kunveno.

2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2011.

La kontoj, prezentitaj en la Boletín n-ro 397, estis aprobitaj unuanimece.

3.- Aprobo de la Raporto pri aktivajoj de 2011.

La raporto, prezentita en la Boletín n-ro 397, estis aprobita unuanimece.

4.- Informo pri la anaro:

Aniĝintaj je la dato 31a decembro 2011 (maksimume ŝuldas du jarkotizojn):

Individuaj (OM, DM, PM kaj HM): 156 (el kiuj 9 apartenas al la junulara sekcio HEJS)

Kolektivaj: 13

Entute: 169

Pedro Hernández demandas ĉu gravas kreskigi la membrojn aŭ kreskigi la enspezojn de la Asocio? Ĉu la malaliĝintaj membroj klarigis la kialon de ilia malaliĝo? La prezidanto respondas, ke ni devas esti realismaj, ni estas, kiuj ni estas. La vicprezidanto Miguel Gutiérrez rimarkas, ke multaj homoj lernas E-on sed poste ili ne sentas sin kiel membroj de HEF, do sugestas krei novan kaj modestan aliĝon. La prezidanto respondas, ke la ideo estas interesa kaj indas pridiskuti ĝin poste. Iu ano de la Valencia E-Grupo komentas, ke en sia grupo okazas same. Okazas debato pri la malaltiĝo de la kotizo ligita al al ricevo de la Boletín nur interrete, sed la prezidanto sugestas lasi la debaton por iu pli taŭga posta punkto de la tagordo, kaj rilate al tiu afero pri havi malsamajn kotizojn pripensas, ke eble oni devas disvolvigati la membran kategorion “simpatianto”, kiu aperas en la Statuto de la Asocio. Luis Hernández el Valadolido komentas, ke la malnova sistemo de E-Grupoj estas en deklivo, kaj demandas kial ĉio estas senpage rete? Kial HEF ne postulas pagi por ricevi retajn servojn?, la prezidanto rimarkas, ke ĝi estas tre bonaj demandoj kaj oni esploros kelkajn ideojn, ekzemple, ne aperigi Boletín rete tuj post ĝia papera eldono. Ankaŭ oni devas instigi la aliĝon al HEF de la membroj de la asocioj aliĝintaj.

Kani demandas ĉu oni studas ĉu antaŭ aŭ post kongresoj de HEF kreskas la nombro da anoj. Raúl Martínez klarigas, ke estas homoj kiuj rekte kabeas, homoj kiuj diras, ke nuntempe ne havas monon, kaj homoj, kiuj pensas, ke HEF ne donas sufiĉajn servojn, rilate al ĉi lasta li ne konsentas, ĉar la aliĝo al HEF ne temas pri ricevado de servoj sed por helpi malavare al disvastigo de la internacia lingvo. La sekretario Félix Jiménez aldonas, ke doni monon al HEF postulas de la Asocio ricevi ne servojn, sed agadon por tiu menciita disvastigo de E-o, kaj ke oni devas konsideri malsame la individuajn membrojn ol la kolektivajn (asociojn). Ana Manero komentas, ke estus bona ideo peti monon por konkretaj agadoj, kaj Manolo Pancorbo aldonas, ke kelkaj anoj jam demandis tion antaŭe de la Estraro (mandato 2012-2016).

5.- Renovigo

Okaze de la fino de la mandato de la nuna estraro (2008-2012) oni devis tute renovigi ĝin. Kandidatiĝis: José Antonio del Barrio (Prezidanto), Ángel Arquillos (Vicprezidanto), Félix M. Jiménez (Sekretario), Raúl J. Martínez (Kasisto), Jesús García (Voĉdonanto-HEJS), Juan José Vera (Voĉdonanto-Boletín) kaj Luis Eduardo Berdor (Voĉdonanto). La kandidatoj estis elektitaj unuanimece, do la nova estraro restas jene:

Prezidanto: José Antonio del Barrio (Madrid)

Vicprezidanto: Ángel Arquillos (Malago)

Sekretario: Félix M. Jiménez (Madrid)

Kasisto: Raúl A. Martínez (Reĝurbo)

Voĉdonanto (Boletín): Juan José Vera (Madrid)

Voĉdonanto (HEJS): Jesús García (Alcázar de San Juan-Reĝurbo)

Voĉdonanto: Eduardo Berdor (Zaragoza)

6.- Projekto 2012

Oni festos la 125an datrevenon de la “Unua Libro”: la Prezidanto invitas al la anoj partopreni en la Projekto kaj petas ĉu iu deziras enterpreni iun konkretan agadon, bv. komuniku ĝin al la estraro. Krom tio, oni okazos kursoj, ekspozicioj, ktp.

Manuel Pancorbo (Prezidanto de “Fundación Esperanto”) legas la agadon de la Fondaĵo por 2012.

7.- Kotizoj por la jaro 2013

La kotizoj por la jaro 2013 restos same ol tiuj de 2012: Individua Membro 32,00 € kaj Kolektiva Membro 64,00 €. Oni aprobas ilin unuanimece.

8.- Aprobo de la Buĝeto por 2012.

La Buĝeto, prezentita en la Boletín n-ro 397, estis aprobita unuanimece.

9.- Sugestoj kaj demandoj:

Luis Hernández klarigas, ke ekzistis eraro en la peto de la estraro por kandidatiĝi kiel komitatano en UEA. La estraro petis “B- Komitatano”, kaj tio ne estas, la peto estas por esti “A-Komitatano”. Tio estis printa aŭ konfuza eraro.

Pedro Hernández, nuna ĉefdelegito de UEA en Hispanio, petas ne daŭrigi sian postenon. Do, la posteno restas vaka. Rafaela Urueña proponas “ion tiklan” (laŭ siaj propraj vortoj): Pedro Garrote el Valadolido kiel ĉefdelegito antaŭ UEA.

Rilate al la afero kun Esperanto Eŭropa Unio (EEU), la Prezidanto informas, ke ĝi konsistas el aparta asocio kaj HEF ne estas tre kontenta pri la agado de EEU ĉar ŝajnas, ke ĝi agadas iel, kiel ne kongruas kun la neŭtraleco de HEF. HEF petis klarigon al EEU kaj ĝis la alveno de la respondo, la estraro decidis ne pagi la jaran kotizon por ne apogi projekton, kiu ne respektas la neŭtralecon de HEF. Pedro Hernández rimarkas, ke vere EEU ne kongruas kun al celoj de HEF, kaj Manuel Pancorbo opinias, ke prefereble HEF restu en EEU por almenaŭ voĉdoni kontraŭe al la nuna politiko de la estraro de tiu asocio. La Prezidanto memoras al ni, ke baldaŭ okazos kunveno de EEU en Irlando, sed ŝajnas, ke neniu HEF-ano partoprenos. Do, rilate al la “civitana iniciato” proponata nuntempe de EEU, la sinteno de HEF estas ne partopreni en ĝi.

Sen pliaj aferoj por pritrakti, finiĝas la kunveno je la 11:30 horo.

La Prezidanto, La Sekretario,

INVITO AL KONGRESOJ EN 2013

La estraro de Hispana Esperanto-Asocio akceptis la inviton de la Aragona Esperanto-Asocio "Fratego" okazigi la 72-an Hispanan Kongreson de Esperanto en la urbo Zaragozo, komence de la monato majo 2013. Vidu fine de tiu ĉi Bulteno la unuajn informojn kaj aliĝilon.

La Iberia Renkontiĝo, la tutjara kunveno de junuloj en la duoninsulo, estos organizata dum la jaro 2013 de Hispana Esperantista Junulara Societo. Ĝi okazos en Madrido, dum la semajnfino de la 15-16-17 de marto. Pri programo kaj aliaj detaloj ni informos en venontaj numeroj.

La venonta kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos venontjare en Madrido, konkrete inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2013. Eblas aliri ĝisdatigitajn informojn per retpaĝo: <http://satesperanto.org/>. Tie troviĝas ankaŭ la aliĝilo, plus listo de jam aliĝintaj partoprenantoj. Eblas kontakti la Organizan Komitaton en la poŝta adreso: Asociación “Izquierda y Esperanto”, Apartado de correos 8537, ES – 28080 – Madrid, kaj rete: esperanto@nodo50.org.

En venonta numero aperos novaj informoj pri tiuj kaj aliaj regionaj kaj internaciaj renkontiĝoj.

GAZETARA AGADO

Dum la lastaj monatoj, nia lingvo multe eĥis en la amaskomunikiloj de Hispanio. La plej granda akumuliĝo de mencioj okazis dum kaj tuj post la Kongreso en Almagro. Jam antaŭ la komenco de la sesioj aperis mencioj al la Kongreso en la lokaj ĵurnaloj, sekve al gazetarkonferenco kiun Raúl Martínez celebris kun la urbestro de Almagro. Dum la kongreso mem aperis diversaj ampleksaj informoj. Tuj post la fino, ampleksa raporto de la loka delegito de la novaĵagentejo EFE estis publikigita en multaj gazetoj



de la tuta lando, inter kiuj plejmulto el la grupo Vocento, kun la titolo “Esperanto estas viva funkcia lingvo”, citante el intervjuo al la prezidanto de HEF. Vidu ekzemple la tekston en la ĵurnalo ABC en <http://www.abc.es/agencias/noticia.asp?noticia=1157737> Kiel kulmino, fine de majo, la porenlanda stacio de la Nacia Radio de Hispanio, Radio Exterior de España, intervjuis la prezidanton de Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS), Jesús García Cano, okaze de la hispana kongreso en lia devenregiono. Oni povas aŭskulti ĝin ankaŭ en la reto, en la adreso

Dum la datreveno

Plej granda rikolto okazis ĉirkaŭ la 26-a de julio, kiam oni festis la 125-an datrevenon de la publikigo de la Unua Libro, sekve al gazetarkomuniko lanĉita de Hispana Esperanto-Federacio. La precipa atingo estis la apero de raporto pri Esperanto en la teleĵurnalo de la ŝtata televido TVE. Ĝi estis filmita en la madrida librejo "Casa del Libro", kun la apero de la prezidanto de HEF, la verkisto Miguel Fernández, kaj ĉefe diversaj parolantoj, plejparte junaj, en sufiĉe altira kaj senĝena etoso. Eblas spekti la pecon en la retejo de RTVE, en jena ligo: <http://www.rtve.es/alacarta/videos/telediario/hace-125-anos-nacio-esperanto/1491568/>.

La novaĵo pri la datreveno aperis ankaŭ en la kulturaj repaĝoj de la ĵurnalo ABC, en alternativaj retejoj kiel "Rojo y Negro" (de la sindikato CGT), "Estudios" (de la CNT) kaj "Tercera Información", kaj atingis la ĉefpaĝon de la novaĵreto Meneame.net, unu el la plej vizitataj en Hispanio, kun ligo al la retejo de HEF.

Tuj poste, bonega plenpaĝa artikolo pri Biblioteko Molera aperis la 27-an de junio en ĵurnalo "Regió7", kiu eldoniĝas en Manresa kaj estas tre populara en centra Katalunio.

Ankaŭ la prezidanto de HEF estis intervjuita en la Regiona Radio de Murcia, en la programo "Adelantos", aperintan la sabaton 28-an de julio.

La 7-an de aŭgusto aperis ampleksa, sed ne tre akurata raporto, en la konata kultura programo "El ojo crítico" de Radio 1, RNE, pri la 125^a datreveno.



La 18-an de aŭgusto publikiĝis raporto en valencia ĵurnalo “Levante” pri la lingvo kun mencio al la nova kaj aktiva loka grupo de Oliva, kaj intervjuo al ties aktivulo Enric Baltasar.

Nova kampanjo de informado fine de aŭgusto alportis pluajn radiajn fruktojn: la 28-an de aŭgusto José Antonio del Barrio estis intervjuita en du radioj, pri la datreveno. En Radio Canarias je la 9,30 loka tempo (10,50 duoninsule) kaj je la 12,10 en Punto Radio, en la tradicia kaj konata programo "Protagonistas".

Tiuj tri cititaj radiaj intervjuoj estas aŭskulteblaj rekte en la Bitoteko de HEF, per la mallongaj adresoj:

<http://hdl.handle.net/11013/2171> : Onda Regional de Murcia

<http://hdl.handle.net/11013/2369>: Punto Radio

<http://http://hdl.handle.net/11013/2370> : Canarias Radio

Fine, sekve al tiu kampanjo, raporto pri Esperanto aperis en la teleĵurnalo de la baleara televido IB3, la 23-an de septembro, kun partopreno de Xavier Margais kaj Nicolau Dols, dekano de la Fakultato pri Filozofio kaj Homaj Sciencoj de la Universitato de la Balearaj Insuloj.

La estraro de HEF pli intencas intensigi la agadon cele al amaskomunikiloj, kaj por tiu celo decidis nomumi specialan komisiiton por tiu celo, Ricardo Biurrún, kiu jam ekoficis komence de la somero, kaj al kiu ŝuldiĝas granda parto de la lastaj atingoj.

HEF

ESPERANTO EN LA NACIA BIBLIOTEKO

Okaze de la 125-jariĝo de Esperanto, la Nacia Biblioteko de Hispanio organizis bibliografian ekspozicion pri Esperanto, dum granda parto de la monatoj aprilo kaj majo.

Ĝi okupis la kvar vitroŝrankojn situantajn inter la halo de la Biblioteko kaj la ĉambreto kiu donas eniron al la ĉefa legosalono.

La ekspozicio enfokusigis ĉefe sur la esperantaj eldonitaĵoj aperintaj nialande kaj konsistas el kvar aksoj. Unue ĝi prezentas specimenojn el la unuaj publikigaĵoj en Hispanio. La dua pritraktas la figuron de Juan Régulo Pérez, stimulant kaj eldonanto de esperantaj verkoj ekde 1952. La tria akso montras la verkaron de la ĉefaj hispanaj nuntempaj aŭtoroj. Laste oni montras miksaĵon de verkoj, kiujn diverskiale oni povas konsideri gravaj.

Ĉi tiu iniciato de la Nacia Biblioteko ja dankindas, ĉar ĝi helpas diskonigi la verkojn, kiujn en Esperanto aŭ pri Esperanto oni eldonis en Hispanio. Cetere, en 2012 oni jubileas ankaŭ la 300-jariĝon de la Nacia Biblioteko.

Okaze de la ekspozicio, Madrida Esperanto-Liceo organizis kolektivitan viziton por esperantistoj la 8-an de majo. Respondeculo de la Biblioteko informis la vizitantojn pri la historio, celo kaj strukturo de tiu institucio kaj la konstruaĵo. Oni havis la okazon viziti la bibliografian ekspozicion pri Esperanto, kaj poste oni konatiĝis kun la ĉefa legosalono, kaj ankaŭ aliajn ĉambrojn kaj arĥivejojn de la impona konstruaĵo.



NOVAĴOJ

ESPERANTO EN TEKNIKA KOMITATO DE ISO EN MADRIDO

Dum la lasta semajno de junio 2012 okazis en Madrido kunsido de tutmonda Teknika Komitato pri terminologio kaj aliaj lingvaj kaj en-havaj rimedoj de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kiu okupiĝas pri diversaj temoj rilate al lingvoj, ĉefe terminologio, sed ankaŭ interalie tradukado kaj interpretado. Tiu teknika komitato (formale nomita ISO/TC 37) konsistas el dudeko da laborgrupoj, kiuj siaflanke okupiĝas pri konkretaj projektoj.

Universala Esperanto-Asocio (UEA) kiel kunlaboranta organizaĵo estis invitita aktive partopreni. Tial dum tiu semajno vizitis Madridon la komisiito pri terminologio de UEA, Mélanie Maradan, kiu partoprenis dum la sesioj de la komitato.

Ŝi ankaŭ partoprenis en la jara kunveno de Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio. UEA fariĝis membro de Infoterm en 2011. Fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj Aŭstra Normiga Instituto (ASI), Infoterm celas i.a. interŝanĝi informojn, subteni kaj kunagadi por projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp., ĉefe en la kampo de terminologio. Ĝi devenas el la terminologia esplorcentro, kiun fondis kaj longe prizorgis Eugen Wüster, esperantisto kaj fondinto de la moderna terminologia scienco.

TED en Madrido enhavis prelegon en Esperanto

La 15-an de septembro okazis en Madrido serio da konferencoj, laŭ sistemo konata kiel TED (laŭ la angla akronimo por Tehnologio, Distriĝo, Dizajno), sufiĉe fama inter avangarduloj en la reta mondo. Tiu evento TEDxMadrid enhavis novaĵon: unu el la prelegoj



Inicio Ponentes Unconferencia Qué es TED Patrocinadores Equipo Pide una entrada Eventos anteriores Contacto

David de Ugarte

Indiano kaj ludema

Economista, teknologo y emprendedor comprometido con los nuevos modelos de Democracia económica y el desarrollo del modo de producción P2P. Fundador y teórico del grupo ciberpunk español (1989-2007), fundador de Plensa in red SA (1999-2002) y después de la Sociedad Cooperativa de las Indias Electrónicas (2002) y del Grupo Cooperativo de las Indias en el que está encargado del desarrollo de negocio in América del Sur. Autor de ficción en extraños formatos, escribió dos novelas por entregas para teléfonos móviles:

"Lia: MAD phreaker" (e-moción 2003-2004) y "Días de frontera" (e-moción 2002-2006). Autor de ensayos como «11M: redes para ganar una guerra» (2004) o la «Trilogía de las redes», formada por los ensayos «El poder de las redes», «Filés: De las naciones a las redes» y «Los futuros que vienen», traducidos a media docena de lenguas, con decenas de miles de ejemplares vendidos en



Blogroll

- Maltadero – Madrid
- Ted Education
- Ted x Youth Madrid
- Ted.com
- TEDxMadrid en Pinterest

© 2012 TEDxMadrid

La preleganto estis [David de Ugarte](#), ekonomikisto, teknologiisto kaj entreprenisto engaĝiĝinta por la novaj modeloj de ekonomia demokratio kaj la samtavola (P2P) produktadomaniero, fondinto kaj teoriulo de la hispana kiberpunka grupo kaj nun kun ĉefa fokuso en la kooperativo Grupo Cooperativo de Las Indias ("Indjana Kooperativa Grupo"), kie la rilatoj inter la membroj sekvas la frue kovitajn principojn de egaleco kaj ekonomia demokratio.

David kaj lia grupo alproksimiĝis antaŭ kelkaj jaroj al Esperanto, plu konservis intereseon, ofte blogis pri nia lingvo, kaj pritraktis la Esperantan komunumon en siaj libroj kaj eseoj (menciindas la ĉapitro dediĉita al Zamenhof en la libro "De la nacioj al la retoj"), sed ne partoprenas la konvencian movadon. De kelkaj jaroj kunlaboras kun la grupo aktiva kaj delonga esperantisto Manuel Ortega, kiu mastrumas la retejon "La Indjana Kuriero", kaj en la lastaj monatoj la grupanoj kreskigis sian engaĝiĝon al Esperanto, tiel ke ili nun multe praktikadas la lingvon, kaj ĝin propagandas en aliaj medioj.

La organizantoj ebligis la rezervon de lokoj por ĉeesti la serion de prelegoj, por tiuj kiuj sin identigis kiel esperantistoj en la formularo por peti sidlokojn.

kaj novajaj (kiel "The Huffington Post" en la hispana) kaj en sociaj retoj kiel Twitter. Ĝin eblas spekti en la reto, kaj specife en la retejo de la konferencoj <http://www.tedxmadrid.com/>.

Intervjuo al David de Ugarte

(sekva intervjuo aperis antaŭ la prelego en la reta gazeto "Libera Folio"; demandojn faris Toño del Barrio)

Libera Folio: Kiu estas via rilato al Esperanto? Kiam vi ekinteresiĝis pri ĝi?

David de Ugarte:

Mia unua alproksimiĝo al Esperanto estiĝis el la ekkonsciĝo pri la konsekvencoj de la lingva imperiismo post partopreni, kun aliaj indjanoj, diversajn internaciajn kongresojn kaj konferencojn. Mi klare komprenis kiel en kelkaj internaciaj strukturoj lingve bazitaj sur la angla, la denaskaj parolantoj kaj la dulingvuloj de aliaj landoj centralizis la povon por rakonti tion kion la organizantoj aŭ la kongreso deziras aŭ interkonsentas. Ne temas nur pri internacia aŭ etna problemo. Dulingvuloj hegemonio de naturlingvoj signifas ankaŭ la centralizadon de la eksteraj rilatoj en la nia organizaĵo, ĝi sinonimas al nesimetriigo de nia propra ena demokratio. Kaj tio kio okazas al ni, en la mondo de la sociaj kaj kooperativaj organizaĵoj, okazas ankaŭ en aliaj medioj: akademia, ekonomia, ktp.

Sed mi fine komencis lerni Esperanton kiam ĉiuj indjanoj - tio estas, ĉiuj membroj de niaj kooperativoj - interkonsentis komenci uzi Esperanton kiel nian laborlingvon.

Demando: Kiel kongruas Esperanto kun la ideoj malantaŭ viaj filozofio kaj tiu de la "indjana" grupo?

David de Ugarte: La indjana grupo estas sennacia, sed la indjanoj estas transnaciaj: kio unuigas nin estas ludema etiko kaj demokratia kaj komunaĵa konceptigo de la entreprenoj. Ni ne volas dividi nin laŭ nacia aŭ lingva origino, sammaniere ni ne volas dividi

nin laŭ seksoj aŭ raso. Por esti indjano kaj labori en niaj kooperativoj, nur liberecana spirito kaj ludemula laboretiko estas necesaj.

Se ni konservus la hispanan, nian gepatran lingvon, kiel laborlingvon, la sola propono kiun ni povus fari al la plimulto da homoj kiu volas labori kun ni estas partopreni niajn estas normale membroj de bonhava socia klaso kiuj lernis en specialaj lernejoj. Do, la kooperativojn akceptante bazan malegalecon. Aŭ ni havas ene la saman problemon de lingva imperiismo ol la internaciaj organizaĵoj, aŭ ni devos limigi nian kreskon al la hispanaj kaj portugalaj parolantoj.

Dum kelkaj jaroj ni prenis la duan vojon ĉar laborante ĉefe en la Sudameriko aŭ kun sudamerikaj organizaĵoj ĉiuj kandidatoj estis denaskaj parolantoj de la Hispana aŭ la Portugala.

Sed ĉi-jare ni decidis, pligrandigi la nian agadon en la Ibera duoninsulo, krei novajn entreprenojn kaj kooperativojn en Biskajo kaj starigi rilatojn kun aliaj eŭropaj kooperativoj kaj sociaj organizaĵoj. Do, antaŭ tri monatoj ni decidis elekti sintezan, neŭtralan kaj facilan lingvon kiel laborlingvon. Post mallonga debato pri la opcioj, ni elektis Esperanton, kaj komencis lerni ĝin. Hodiaŭ, du monatojn kaj duonon poste, ni parolas dum 70% el la labortempo Esperante, kaj nia celo estas baldaŭ paroli Esperante la tutan tempon.

Nia pripenso estas ke se ni lernis paroli en kelkaj monatoj, ankaŭ la novaj indjanoj povos lerni rapide, kaj ekhavi tiel samtavolan pozicion en nia laborkomunumo.

Demando: Kiel ekestis la ideo paroli en Esperanto en TEDx? Kiu estis la reago de la organizantoj, kaj ilia sinteno al nia lingvo?

David de Ugarte: Mi intervjuiĝis en kafeja teraso kun Antonella Broglia, la direktoro de TEDxMadrid, por elekti temon. Unue ni parolis pri la niaj projektoj, pri kooperativismo... estis tre frue en la mateno, kaj aliaj indjanoj pasis antaŭ ni kaj salutis min Esperante. Ŝi demandis al mi ĉu ni estas esperantistoj kaj mi rakontis al ŝi kial ni elektis Esperanton kiel nian laborlingvon. Ŝi tuje diris al mi ke tio certe estus la plej novigeca temo kaj ke mi devus prelegi pri tio!!

Demando: Ĉu okazos tradukado? Kiel oni organizos ĝin?

David de Ugarte: Jes, la tekstoj de mia parolado projekcie aperos en granda ekrano kiu estos super la podio. Sed ne estos samtempa tradukado. Mi disponos je alia malgranda ekrano antaŭ mi kun la sama projekciaĵo por adekvate aranĝi ĉion...

Demando: Kiuj estas viaj estontaj planoj pri agadoj kun rilatoj al Esperanto?

David de Ugarte: En malpli ol tri monatoj ni verkis en Esperanto manifeston por la samtavolana produktadomaniero kiel utila ilo kontraŭ la krizo kaj ni preparis tiun ĉi TED-prelegon. Nun, post la prelego, ni volas paŝi antaŭen: nia venonta projekto estas organizi "Esperanto-vilaĝon".

situanta geografie en la centro de la kultururisma regiono de la Biskajo (apud Bilbao, Gernika, la plaĝoj kaj la montaroj) en kiu ni instruos al la laboristoj de la vendejoj kaj de la publikaj servoj paroli bazan Esperanton. Ni ankaŭ laboros kun diversaj kultururismaj entreprenoj, la Esperanto-asocioj kaj eŭskaj kulturorganizaĵoj por prepari kune kulturajn ofertojn en la nia lingvo en la Esperanto-vilaĝo kaj vojaĝoj tra la regiono kun esperantistaj profesiaj gvidantoj.

Ni volas nun krei bonajn, interesajn ofertojn por ĉiuj la esperantistoj kaj kunlabori poste kun la aliaj esperantaj urboj kiuj disvolviĝas nun tra la Eŭropo. Ni ja revas pri Eŭropa reto de Esperantaj urbetoj kiel nova kultura "Vojo de Sankta Jakobo". Imagu koni la diversajn Eŭropajn kulturojn kaj lingvojn feriante ne multekoste en Esperantaj urbetoj kaj ĉiam parolante nian lingvon!!

PRESKAŬ 10.000 VIZITOJ AL AJUTUBA KANALO DE HEF

Dum la lastaj monatoj oni povas konstati notindan kreskon de la nombro da vizitoj al la kanalo de Hispana Esperanto-Federacio en Jutubo (*Youtube*) <http://www.youtube.com/esesperanto>.

La kialo estas ke nuntempe ni ekpublikigadis diversajn pecojn filmitajn dum la lasta Hispana Esperanto-Kongreso kiu ĵus finiĝis en Almagro. Ni invitas vin ĵeti rigardon. Ili inkluzivas diversan materialon, rilatan al la muzikaj programeroj, aŭ al la spektaklo "Vivu la Teatro!" kiu disvolviĝis en la [teatra urbo](#). Aŭ oni simple komencu per la [ĝenerala resumo de la Kongreso](#), kiu dum 10 tagoj ricevis pli ol 750 vizitojn, kaj kiu perfekte montras superrigardon de la renkonto, kun la varieco de la programo kaj la mirinda etoso kiu ĝin karakterizis.



ESPERANTISTOJ AKTIVIS EN RIO+20

La fama urbo Rio-de-Ĵaneiro en Brazilo gastigis la Konferencon de Unuiĝintaj Nacioj pri Daŭripova Evoluo, [Rio+20](#), okazintan de la 13-a ĝis la 22-a de junio. Ŝtatestroj kaj aliaj politikistoj el 193 membroŝtatoj de UN kaj reprezentantoj de la civila socio kunvenis en la kongresejo Riocentro. La nomo Rio+20 referencas al la unua tia konferenco en Rio-de-Ĵaneiro en 1992.

Samtempe okazis Kupolo de la Popoloj, kie renkontiĝis miloj da NRO-representantoj por observi la laborojn de la registaraj reprezentantoj kaj por komune ellabori proprajn proponojn surbaze de spertoj konkretaj kaj ne nur teoriaj. Temis pri vera festivalo de la homaro, kie en la vestaĵoj de sudamerikaj indiĝenoj, afrikaj triboj k.a. oni vidis la buntecon kaj la diversecon de la popoloj. Inter 500 paralelaj eventoj en Riocentro kaj en la Kupolo de la Popoloj ankaŭ teamo de dudeko da esperantistoj realigis diversajn aktivajojn.

La jam fama temo de UN *La estonteco kiun ni deziras* inspiris la mondan komunumon prezenti siajn sugestojn. La nia estas *La lingvo kiun ni deziras*. Aktivaj gejunuloj portis helverdan ĉemizon, proklamantan fronte en la angla *Esperanto - the language we want* kaj dorse en Esperanto *Ni volas tiun lingvon* kun la adreso de la retejo www.lernu.net. Miloj da NROj prezentis proponojn por prelegi pri neimagebla kvanto da temoj. UEA kun TEJO kaj la vegetarana asocio TEVA sukcesis fari tri prezentojn (po 30 minutoj) pri la temo *Dauripovaj konkretaj proponoj por nova estonteco*. Prelegis d-ro Francisco Wechsler, la ĵurnalistino Renata Ventura kaj Ursula Grattapaglia.

Dum la daŭro de la evento ĉiuj ses reprezentantoj de UEA, akredititaj ĉe UN, frekventadis diverstemajn prelegojn, ĉe kiuj oni ofte debatis en pluraj lingvoj kaj la lingva problemo do estas evidenta. Paralele, en la Kupolo, grupo da junuloj prelegis en tendoj, dialogadis kun centoj da interesatoj pri dauripova lingvo kaj lingvaj rajtoj kaj intervenis en liberaj debatoj.

Alvaro Motta kaj Rafael Zerbetto partoprenis aktive la junularan konferencon *Youth BLAST*, kie ili havis kelkajn bonajn okazojn por reliefigi la lingvan situacion kaj la proponon de UEA. Entute 200 gejunuloj el la tuta mondo sendis 2-minutan videon pri la temo *La estonteco kiun ni deziras*. Inter la gajnintoj, po 3 el ĉiu kontinento, Rafael Zerbetto estas unu el la tri amerikanoj. Li estas plurfoje invitita prezenti sin antaŭ gravuloj. En sia filmo li parolas en Esperanto pri la naturkatastrofo en Amazonio kun angla subteksto. *Vere revolucie! Ĉiuj aliaj obeeme parolas nur en la angla*, diris Ursula Grattapaglia pri la filmo.



RIO+20
Konferenco de
Unuiĝintaj Nacioj
pri daŭripova
evoluo

Laŭ informo de UEA

Raporto pri la 71a Hispana Kongreso de Esperanto en Almagro 2012

Kiam mi alvenis en la urbeton Almagro, mi miris pro tiom da beleco kaj historiaj konstruaĵoj. En unu el la plej famaj palacoj de la urbo, kiu, siatempe apartenis al la Grafoj de Valparaiso, disvolviĝis la 71-a Hispana Kongreso de Esperanto. La plimulto el la ĉeestantoj ĝuis sufiĉe grandan klimatizitan kaj komfortan dormoĉambron ĉe la palaco, kontraŭ tre malalta prezo. La ceteraj elektis hotelojn kaj historiajn gastejojn de la urbo.

Iom post iom alvenis homoj el la tuta Hispanio kaj eksterlando: Usono, Australio, Japanujo, Rusujo...kiuj salutis nome de iliaj asociaj landoj.

La unua afero post la solena malfermo, estis vizito al la ekspozicio pri Esperanto en ĉarma palaco proksime de la kongresejo, kiun ni trafis piede. Tuj poste, kaj kun la celo konatiĝi kun la urbo, granda grupo da homoj trairis la historian centron por miri kaj atente aŭskulti la simpatian ĉiĉeroninon, kiu tre afable kaj lerte malkovris anekdotojn kaj kuriozaĵojn pri diversaj palacoj, monaĥejoj, teatroj, kaj elstaraj homoj, kun tre bona traduko al la internacia lingvo de nia samideano Jorge Camacho. La vetero estis tre agrabla malgraŭ kelkaj minacantaj nuboj sur la horizonto, kiuj, konsciis pri nia feliĉo, kaj tuje malaperis kaj ni, senprobleme kaj kun kalmo, finis nian agrablan promenadon reveninte ĉe la kongresejo kie okazis la interkona vespero.

Perrete vi povas malkovri pli detale la interesan historion pri Almagro, ĉar mia raporto temas pri la kongreso kaj ankoraŭ mi traktos plurajn aferojn pri ĉi evento.

Sabate okazis akceptado de kongresanoj. Por vigligi la etoson, en la ĉefa salono, ni ĝuis kelkajn kantojn interpretitaj de la madrida fama grupo "Kvaropo Sinkopo" kaj tuj poste ni gustumis bongustan aperitivon, regalo de la LKK, kun abunda trinkaĵo kaj tipaj apetitigaĵoj, kaj elmontrado de loka perbastoneta punto realigita de tre ĉarma sinjorino.

Unu el la ĉefaj punktoj de la kongreso temis pri Festado de la 20-jara datreveno de la Ibera Skolo de Literaruro en Esperanto, kies membroj parolis, deklamis, kantis kaj humuris pri iliaj verkoj en pura kaj belsona esperanto. Estis delico aŭdi ilin.

Alia interesa kaj menciinda afero temis pri Kina Festivalo, produktado de filmoj en kaj pri esperanto, kiel: "La universala lingvo" filmita de usona premiita reĝisoro Sam Green, aŭtoro, interalie de pluraj dokumento-filmoj kiel "The Weather Underground" kaj "Utopio en kvar movoj". La 30-minuta filmo kiu spuras la historion de Esperanto kaj estas portreto de la hodiaŭa Esperanto-movado. La filmo ankaŭ inkluzivas intervjuon kun Humphrey Tonkin, Arika Okrent kaj multaj aliaj. "Stranga Nupto" estas tute alispeca peco: amatoraĵo filmita de iamaj anoj en la Madrida Esperanto Liceo fine de 1979, ktp.



En la historia kaj mondfama teatro (la plej malnova en Eŭropo, 17-a jarcento) "Corral de Comedias", "Komedikorto" okazis interesa reprezentado, kun ĉeesto de preskaŭ ĉiuj kongresanoj, kiuj plenigis la etan teatron. Tri lokaj geaktorj amuzigis nin per interesa komedieto, majstre interpretita kaj lerte miksitaj kun geniaj frazoj en esperanto.

Dimanĉe, ni okazigis nian Ĝeneralan Kunvenon, ĉefe por reelektado de la nova estraro kaj pretigado de eventoj, okaze de la 125 datreveno de esperanto. Tonjo del Barrio estis konfirmita kiel prezidanto de HEF. Aliaj aferoj temis pri Ronda debato pri esperanto-agado en niaj kluboj kaj en la reto, prezentado de esperanto-ludo "Talismanoj", kunveno de HEJS, Kvizo. Mi tute ne kapablas ordigi la programon, tamen ĉio okazis bonorde kaj en bona etozo. Je la 20:30 h. en la Teatro Municipal de Almagro, la Ibera Skolo reprezentis la spektaklon "Vivu la Teatro" prezentita de Ana Manero kaj Miguel Fernández, kun deklamado de famaj poemoj, teatraĵo pri la verko "Sanga Nupto" de Garcia Lorca, interpretita de madrida aktorino, Laura Pascual, humuraĵo, ktp. La teatro estis je nia dispono kaj ni plene profitis la okazon.

Lunde ni ĝuis tuttagan ekskurson al la fama urbeto Campo de Criptana, menciita de Miguel de Cervantes en la verko Don Kihote de la Manĉa, kie ni vizitis kelkajn ventmuelejojn kaj ĉefe vinkelon por gustumado de vino. Ankaŭ ni tagmanĝis en pitoreska restoracio kun surprizo de reprezentado de historieto pri Don Kihoto. Ni ankoraŭ havis tempon reveni al la kongresurbo por ĝui koncerton de la fama grupo, "Kaj Tiel Plu", kaj aldone, la tre agrablan surprizon de Alejandro Cerro, loka kantisto, kiu interpretis en esperanto, kanconon tradukita de li mem.

Marde antaŭ ol la solena malfermo, Ana Manero projekciis interesan bildaron pri "Bitoteko, lastaj plibonigoj kaj atingoj", pli poste, prezentado de novaj libroj, prezentaĵo de asocioj kaj projektoj, komuna bankedo, Aŭkcio kun oferto de interesaj libroj poŝtmarkoj, esperantaĵoj, ktp, kiuj estis aĉetitaj per "alta monsumo". Sekve okazis la 2-a parto de la Festado de la 20-jara datreveno de la Ibera Skolo, kiuj ricevis belan memoraĵon.

Estas neeble informi detale pri ĉiuj pazintaj temoj temoj, ĉar estus necese kelkajn paĝojn por verki pli delalan raporton, ĉar ne estas loko en la bulteno, sed mi ne devas forgesi la lingvan kurson por komencantoj, gvidata de Alejandro Pareja, Peĉakuĉon, vigla metodo gvidata de Manolo Pancorbo, en kiu oni komentas 20 bildojn po 20 sekundoj, kaj la interesan prelegon pri observado de steloj, k.t.p.



Ángel Arquillos

La 79-a Itala Kongreso de Esperanto

16 - 25.8.2012

Estis elektita Sicilio por kongresi ĉi-jare. Suno, maro kaj Esperanto altiris multajn geesperantistojn el kvin kontinentoj. La kongreson partoprenis pli ol 330 samideanoj el 32 landoj. La itala nacia kongreso fakte fariĝis internacia. La kongreso okazis ĉe la mediteranea marbordo en multkultura urbo Mazaradelvalo. Mazara havas pli ol 51,000 enloĝantojn. Ĝi situas en la provinco Trapanio. En ĝia historia urbocentro troviĝas multaj preĝejoj kaj aliaj historiaj konstruaĵoj. Tre agrabla estas promeno en la araba kvartalo tra mallarĝaj stratetoj kun domoj surmure ornamitaj per fajencaj bildoj. Dum la kongreso aldoniĝis fajenca ornamaĵo pri Esperanto farita de lernejanoj de la Arta liceo. Ni kongresis en hotelo "Hopps". Multaj el ni ĝuis la hotelan naĝejon aŭ Mediteranean maron. Pro granda varmeco la homoj posttagmeze siestas. La urbo revigliĝas vespere ĝis malfruaj noktohoroj. Amaso da afiŝoj pri prezentaĵoj por la publiko kaj pluraj surstrataj banderoloj anoncis la kongreson. La enloĝantoj havis eblecon "gustumi" Esperanton propraorele kaj propraokule dum ĉiutagaj vesperaj koncertoj.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la kongreso. Unue la membroj de la LKK - Bruĉjo Kasini kaj la prezidanto de Itala E-Federacio Aldo Grassini bonvenigis nin. Sekvis paroladoj de profesoro Khaled Fouad Allam pri interkulturo kaj la festparolado de Barbara Pietrzak, la ĝenerala sekretario de UEA. Intertempe venis la urbestro, s-ro



Nicoló Cristaldi kiu entuziasme bonvenigis nin kaj poste sekvis kutimaj salutoj de E-institucioj kaj de reprezentantoj el diversaj landoj. Post la E-himno la kongreso estis malfermita. La urbestro tre favoras disvastigon de Esperanto. En Mazara estis starigita Centro por Esperanto kaj Interkulturo. Ĝi celas disvastigon de la lingvo en la lernejoj. Jam antaŭ la kongreso pli ol 500 homoj (ĉefe lernejanoj, studentoj kaj instruistoj) sekvis entuziasme kurson de Esperan-

to. La instruado daŭros ankaŭ estonte. La temo de la kongreso estis *Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof*. Ĝi estis pritraktita en du seminarioj gvidataj de Kristin Tytgat kaj Elizabeth Schwarzer. La riĉa programo proponis prelegojn, seminariojn, trinivelajn E-kursojn kaj ankaŭ rapidan kurson de la itala lingvo.

. Katalin Kováts gvidis intensan trejnseminaron por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto. Ŝi ankaŭ zorgis pri KER-ekzamenoj kaj disdonis diplomojn al sukcesintoj de antaŭaj ekzamenoj. Ne mankis libroservo, ekspozicio pri Esperanto, prelegoj kun aperitivo por la publiko, promeno tra la urbo kun la urbestro, kantado kun duopo Ankie kaj Nanne de la muzikgrupo Kajto, mediteraneaj vesperoj kun Davide Astori, noktaj junularaj mojosaj programeroj, animitaj de talenta italo Michael Boris Mandirola. Same kiel lastjare okazis Verda Foiro, kaj eblis aĉeti filatelaĵojn kun poŝta stampo de la kongreso. Sur la ĉefa placo oni starigis podion, kie niaj plej elstaraj kantistoj kaj muzikistoj havis eblecon vespere prezenti koncertojn. Inter la plej famaj estis JoMo, Kim kaj ensemblo Kajto. Ĉiuj havis grandegan sukceson kaj plurcentan publikon. Ankaŭ sur la strandoj aperis kelkaj lokaj muzikantoj, kiuj plezurigis laŭstrandajn promenantojn kaj eĉ instigis iujn al dancado surtrotuare. Al buntaj muzikaj vesperaj programeroj kontribuis impresa mezepoka prezentado de sicilia historio en formo de parado. Bela spektaklo de dancoj, teatrecaj movoj en historiaj kostumoj. Oni komencis ĝin el tempo de antikvaj grekoj, sekvis araboj, normanoj kaj tiel plu ĝis nuntempo. La procesio estis spektata kaj forte aplaudata de homoj starantaj sur plenŝtopitaj trotuaroj ambaŭflanke. Alia nokta procesio temis pri la religia parado por Sankta Vito. En la internacia vespero oni multe kantis, gitar- kaj flutludis, deklamis, teatrumis. La etoso estis gaja.

Tre allogaj estis multnombraj ĉiutagaj ekskursoj al diversaj lokoj ligitaj kun la prahistorio de la okcidenta parto de Sicilio. Ni ĝuis vizitojn al la urboj: Palermo, Agriĝento kaj la Valo de la Temploj - Erice, salmarĉoj kaj Trapani - Salemi, Sciacca, Sambuca. Interesaj estis la templo kaj amfiteatro en Segesta kaj la temploj de Selimunte. Dum tiuj ekskursoj ni vizitis kelkajn muzeojn: pri konkoj, pano, salo, tinuso. Pluraj ceramikaj vendejoj ravis nin kaj ankaŭ vizito de teatro. Koncerne Sicilion oni ofte pensas pri mafio. Ni ne renkontis mafianojn (feliĉe!), sed ni havis okazon viziti muzeon pri mafio. Ni ŝipekskursis al la insulo Flavignan. Iuj preferis biciklajn ekskursojn kaj promenojn.

Ĉie ni renkontis afa-blajn homojn, kiuj ŝatis paroli kun ni kaj iuj eĉ interesiĝis pri Esperanto. La etoso estis varmega same kiel la vetero. La venonta, jubilea itala kongreso okazos en Ligurio en Kastelaro proksime al San Remo. Tie estos nova okazo ĝui interesan E-aranĝon kaj krei novajn amikajn kontaktojn.



Liba Gabalda

La katalogo de Biblioteko Molera enretigita

Du malgrandaj vilaĝoj, ambaŭ ĉirkaŭ 50 km for el Barcelono, kaŝas la plej gravajn trezorojn de la Esperanta kulturo kaj movado en nia lando. En Sant Pau d'Ordal, inter vinberoj kaj persikujoj, la kolektanta pasio de apotekisto Luis Hernández Yzal (1917-2002) iĝis en mirinda muzeo enhavanta ĉirkaŭ 25,000 Esperantaĵoj: libroj, revuoj, poŝtkartoj, afiŝoj kaj memoraĵojn.

Simila estis la travivaĵo de Ramón Molera Pedrals (1922-1983). Ramón, naskiĝinta en vilaĝo Moià (Bagès, Barcelono), Esperantiĝis estante dekkvinjara, tiel fervore, ke «je la komenco mi fidis Esperantigi la tutan landon en malmulte da tempo». Ve, tiun unuan celon li ne atingis, sed por Ramón Molera Esperanto taŭgis kiel ilo por «pensi internacie» kaj donis al li «motivon labori por inda ideo».¹ Ekde la fondiĝo de HEF en 1947, Molera tre aktive partoprenis la reorganizon de la hispana Esperanta movado kaj de la jaro 1953 organizis kaj gvidis korespondan kurson. En 1973, li forlasis siajn postenojn kiel ĉefdelegito de UEA kaj reprezentanto de gazetoj kiel *Heroldo*, *Oomoto* kaj *Sciencia Revuo*, sed lia senlaca kolektado de Esperantaj libroj kaj revuoj neniam velkis (li eĉ eldonis bultenon *Kolektado*, de 1978 ĝis 1981). Iom post iom, per «miloj kaj miloj da leteroj» senditaj tutmonde kaj pere de anoncetoj en pluraj E-revuoj, li amasis gravan gazetkolekton: pli ol 2,000 titoloj de periodaĵoj, «pli ol 8,000 jarkolektoj, de kiuj 4,800 estas kompletaj». Inter la juveloj de tiu ĉi privata kolekto elstaras originaloj de *Lingvo Internacia* kaj eĉ de la unua Esperanta revuo, *La Esperantisto* (1889-1895).



Ana María Molera konsultas la bibliografian sliparon.

La katalogon de tiu vasta kolekto Molera «enkomputigis» en sian cerbon. Lia filino Ana María rakontis jene:

La katalogado de la revuoj estis en lia memoro. En aprilo de 1971 li suferis aŭtomobilan akcidenton. Tuj kiam mi alvenis al la hospitalo li diris: «Ne timu, trankviliĝu, mi fartas bone, vidu, de *La Suno Hispana* mankas n-ro: 68, 69, 89, 90. *Heroldo de Esperanto* estas kompleta. *Esperanto Triumfonta* de la jaro 1920 mankas 2, 5, 6...»²

Post la antaŭtempa forpaso de Ramón, Ana María daŭrigis la kolektadon kaj pligrandigis ĝin per volumoj de aliaj planlingvoj (kelkaj el ili rarajoj el la 19-a jarcento). En 1987, ŝi starigis kun Luis Hernández kaj la hungaro Árpád Máthé Rondon Takács. La laborgrupo nomiĝis tiel omaĝe al József Takács (1890-1944) –kiu en la jaro 1934 eldonis la *Katalogo-n de la Esperanta Gazetaro*– kaj ili celis katalogi la Esperantajn periodaĵojn de *La Esperantisto* ĝis la nuntempo. Ilia grandega laboro fruktodonis per la unua volumo de *Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto*, 1,155 paĝa volumo kiu enhavas bibliografiajn detalojn de 14,143 titoloj el 120 jaroj.

Enretigo de la katalogo

Kadre de la ne tiel utopia celo havigi komunan katalogon al la esperantistaro, la Esperanta-Biblioteko Ramon Molera Pedrals estas nun rete alirebla. Por tiu enretigo, oni uzis la liberan programon OpenBiblio, ĉi-okaze la novan version 0.7.1, kiu enhavas kelkajn plibonigojn por la serĉado. Krom la menciita mirinda gazetkolekto, la datumbazo enhavas pli ol 4.000 libroj en aŭ pri esperanto kaj interlingvistiko. La retadreso de la katalogo estas bibliotekomolera.org/katalogo/opac. La konsultado surloke de la biblioteko eblas laŭ retroŝta interkonsento kun Ana María Molera (molur@telefonica.net).

1. Ramón Molera: «Esperantisto konfesiĝas», *Boletín*, 200 (1973), p. 11.

2. Ana María Molera: «Planlingva Kolekto „Ramon Molera Pedrals”», *Instrui, dokumenti, organizi, fest-libro por la 80-a naskiĝtago de Claude Gacond*, Bad Bellingen, Iltis, 2011, p. 218.

Javier Guerrero

APOGU BITOTEKON!

Bitoteko, la projekto de HEF por konservado de dokumentoj en la reto, daŭrigas sian laboron de prilaborado kaj enretigado de diversa materialo.

Ĝi nun disponas je nova skanilo, sed ni plu bezonas vian helpon, ekonomia kaj labora. Se vi deziras kontribui al ĝia antaŭenigo, vi povas sendi monan kontribuon al la kontoj de HEF, kun indiko pri via deziro ke ĝi estu atribuita al la projekto.

Se vi povas kontribui per via laboro, bv. kontakti kun la kunordiga skipo, ĉe biblioteko@esperanto.es

Dankon pro via helpo!

VIVU LA TEATRO!

(I)

En la pasinta numero de *Boletín* (397), mi informis niajn legantojn pri mia propono realigi omaĝon al la teatro, kadre de nia 71a HEF-kongreso en Almagro.

La afero efektiviĝis. La senlaca, inteligenta kaj efika agado de nia Raúl (Martínez Anguita) atingis du superbajn bazajn elementojn: unuarangan ejon, la belan deknauĵarcentan *Teatro Municipal de Almagro*, kaj unuarangan profesion lum- kaj son-teknikiston, la neforgeseblan Rodrigo. La ceteron atingis nia diligenta kolegaro: dekkvino da diverslandaj esperantistoj, ĉefe hispanaj, kiuj igis nin gapi per sia entuziasmo, per sia nesuspektita aktoreco, per sia kvazaŭa profesieco... Kelkaj el la eroj de la spektaklo rete spekteblas ĉe: www.youtube.com/user/esesperanto.

Vivu la teatro! konstituis veran sukceson, se konsideri la ardan kaj fervoran reagon de la publiko. Tuj post la kongreso, la HEF-prezidanto, José Antonio del Barrio, mesaĝis al mi siajn kontenton, gratulon kaj dankon al ĉiuj partoprenintoj pro ties bona laboro, kaj mi kaptas ĉi ŝancon por transpreni tiajn vortojn, aldoni al ili mian propran plej elkoran varmon kaj transdoni ilin al vi, partoprenintoj, ĉi-medie: Gratulon kaj dankon, geamikoj! Bele, se iam ie ni aranĝos similan mirindan travivaĵon.

Sub la titolo *Vivu la teatro!*, ekde nun *Boletín* publikigos en sinsekvaj numeroj diversajn tekstojn, kiuj, kunmetitaj surbaze de rakontfadeno, kiun mi mem ellaboris, konsistigis la menciitan samtitolan spektaklon. Jen do la unua parto, la komenco. Mallumiĝas la salono, leviĝas la kurteno, la scenejo lumiĝas kaj aperas sur ĝi la gvidantoj, Ana Manero kaj Miguel Fernández:

ANA: Geamikoj:

Teatro, kiel pentr-arto, havas ian magian elementon. Probable, ili ambaŭ naskiĝis kiel sorĉo-formuloj supozataj efikaj por akiri sukceson ĉe ĉasado. Teatro, plie, per sia danca komponanto kiel magiaĵo, celis fari la teron pli fekunda, altiri al ĝi pluvon... Nu, magio restas plu esenco de teatro. Nur enesto de magio en teatro klarigas ties ŝajne eternan allogon. Oni milfoje anoncis la morton de teatro. Kaj jen ĝi, tiel viva, kiel ĉiam, en konstanta renoviĝo ekstera: neniam antaŭe imageblaj novaj teknologioj lumaj, sonaj, dekoraciaj, novaj teknikoj de ludado, novaj konceptoj pri spektaklo, kiuj iras de pleja simpla al pleja komplekseco...

Sed, interne, substance, ĉio en ĝi restas senŝanĝa: teatro estas ŝpegulo, kaj ĉiuepoke la homo bezonas ŝpegulojn por koni la nomojn kaj la formojn de siaj ombroj kaj timoj, de siaj lumoj kaj aspiroj.

MIGUEL: Ŝajnas do nature, ke teatro, ĉar spaca-tempa universalaĵo, meritis ĉiam la atenton de Esperantujo, kaj ke nun, kiam ni estas baldaŭ fariĝontaj 125-jaraj – ĝuste la 26an de la venonta julio okazos tiu datreveno–, ni esperantistoj entuziasme priomaĝas teatron kadre de la 71a HEF-kongreso en la urbo Almagro, unu el kies identigaj trajtoj estas la teatro. La t.n. *Corral de Comedias de Almagro*, 17a-jarcenta korto, kiu bone bildigas unu el la eblaj spacoj uzataj por teatraj spektakloj en la Ora Epoko, tutmonde konatas kaj nuntempe ŝatatas kiel ejo perfekta por ĝui klasikajn teatraĵojn en la atmosferoj materia kaj spirita, kie ili disvolviĝis tiuepoke. Same renomas la ĉiujare organizata Internacia Festivalo de Klasika Teatro en Almagro.

ANA: Komence ni antaŭvidis inviti spertajn teatristojn de Esperantujo por realigi tian omaĝon al la teatro, sed poste ni pensis, ke estas preferinda io malpli profesieca, pli multope kunrolata de komunaj esperantistoj, pli horizontala, pli festa... Nia diseco ne permesus al ni munti formalan teatraĵon, sed eblis, ke ĉiu el la interesatoj en persona omaĝo al la teatro preparu mem ĉu poemon, ĉu prozaĵon, ĉu kanton, ĉu etan monologon... por voĉlegi aŭ reciti. Kaj jen ni staras pretaj montri al vi la rezulton de tia strebo kaj de tia entuziasmo.

MIGUEL: Nia iel teatreca prezentaĵo, konsistanta el serio da unuopaj diversspecaj ludadoj, havos kiel kulminon la spektaklon *La patrino ĉe Lorca, de la madrida aktorino Laura Pascual*.

ANA: Sed ni komencu. *Jam temp' està*. Ni gvidu vin tra la vibroj de niaj kunlaborantoj. Ĉiu el ili konsistigos unu eron diferencon disde la alia, unu teatran personon, sen intencita konekso kun la ceteraj, sed, unu post la alia, kunkonstruos tuton, unu verkon, unu teatraĵon, nian teatraĵon. (*Foriras.*)

MIGUEL: La primitivan teatron konsistigis i.a. popolkantoj. Ĉiuj popoloj kantas. Ordinare, la tekstoj de tiaj kantoj buŝe transiĝas de gepatroj al gefiloj sen alveni al skriba formo, krom en esceptaj okazoj. Poetoj kun nomo kaj antaŭnomo imitas tiajn mirindajn kreaĵojn de la popolo, kaj muzikistoj ilin muzikigas laŭe al la popola gusto. Oni tiel ricevas tradici-tipajn kanzonojn, kiuj kelkfoje eĉ eltenas komparon kun la eskvizitaj kaj eternaj popolkantoj. Ni komencu per unu el tiuj: *Eraris, ve!, la kolombo*. Ĝia aŭtoro estas la andaluza poeto Rafael Alberti. En 1939, ĉe la tuja venko de la puĉistoj, kiuj en 1936 ribelis kontraŭ la laŭleĝa respublika reĝimo, Alberti kaj la edzino, Maria Teresa León, sentis sin devigitaj forlasi Hispanion kaj ekziliĝi en Francio. En Parizo, ili loĝis ĉe la ĉilia poeto Pablo Neruda kaj ties edzino, la argentina pentristino Delia del Carril, apud Sejno. Rafael kaj María Teresa laboris kiel radio-parolistoj. Ĉi-kuntekste la andaluza bardo verkis sian poemon *Eraris, ve!, la kolombo*, kiu, en traduko miaplu-ma, tekstas jene:

Eraris, ve!, la kolombo.

Kia eraro!

*Prenis la Sudon por Nordo.
Kredis la tritikon akvo.
Kia eraro*

*Kredis la nokton mateno;
la ĉielon kredis maro.
Kia eraro!*

*Kredis la stelojn ros-gutoj;
la neĝo-falon, la varmo.
Kia eraro!*

*Vian jupon, sia bluzo;
vian koron, sia ĉambro.
Kia eraro!*

*(Ĝi dormadas nun marborde;
vi, sur alta branĉo-parto.)*

En 1941, la argentina klasikmuzika komponisto Carlos Guastavino muzikigis tiun poemon. Poste, en 1968, la itala kantisto-komponisto Sergio Endrigo italogis ĝin kaj adaptis la muzikon de Guastavino al la gusto de la epoko. Unu jaron poste, la kataluna poeto-kantisto Joan Manuel Serrat, surbaze de la originala teksto kaj de la muzika adapto de Endrigo faris la version plej konatan ĉi-lande. Jen mi, surbaze de mia esperantigo kaj de libera versio *a cappella* de la muziko de Guastavino, prezentas al vi tiun kanzonon:

(Miguel kantas tiun kanton kaj foriras.)

Miguel Fernández



a cappella: itala esprimo uzata por kvalifiki kanton plenumatan nuda-voĉe, sen akompano de aliaj muzik-instrumentoj.

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

En la provinco Kadizo, en la jaro 2008 naskiĝis grupeto, kreita de iaj samideanoj Antonio Casas loĝanta en Los Barrios kaj Daniel Oncala el Algeciras. La ideo estis vekigi la dormantajn geesperantistojn de la provinco kaj stimuli iamaniere, la studadon de la internacia lingvo al ĉiuj interesatoj pri la afero. Ambaŭ regas nuntempe sufiĉe bone la lingvon kaj kapablas vekigi la grupon. Bonan sorton!

En Malago, en la t.n. "Casa Invisible", nia samideanino Carmela San Segundo, gvidas bazan kurson de Esperanto, unufoje semajne, ĉiuvendrede je la 19:00 h. al kiu estas invitataj ĉiuj interesatoj de la urbo.

En la urbo Arundo (Ronda), en la Centro Baba (strato Granada, 33), ĉe la salono "Esperanza" daŭrigas bazan kurson kaj komencas novan nivelon pri meza kurso, ambaŭ gvidataj de samideanino Fátima Jiménez. La kursoj estas finontaj junio 2013.

Alia tre interesa kaj grava notico pri la urbo Ronda, temas pri la blogo de Fátima: <http://fabelodeliliput.com.es/> kies enhavo temas pri poezio kaj mikrorakontoj. Ĉiuj verkistoj kaj poetoj rajtas kunlabori per mikrorakontoj kaj poemoj. La paĝo estas plena je belaj surprizoj por literaturemuloj. Mi forte rekomendas ĝin.

En Kordovo, la sekretario de AEU, José María Rodríguez "Chema", aktive laboras por repreni la grupon kiel la kadizanoj, ĉar en Kordovo estas kelkaj dormantaj geesperantistoj, kiuj jam pretas daŭrigi la laboron. Aliflanke, Chema aranĝas la andaluzian kongreson, okazonta en Granado profitante la Zamenhof-tagon. La evento ofertas interesajn surprizojn, kiel la vizito al Alhambro dum la nokto kaj dum la tago, laŭvole, promenado tra la bela urbo, ktp.

En la regiono Aksarkio, samideano Fabián Jiménez, aranĝas bazan kurson ĉe la

Instituto de Periana IES Alta Aksarkio, kie li laboras kiel profesoro por instrui lernantoj el kelkaj urboj: Alcaucín, Rio Gordo, Canillas de Aceituno, Viñuelas, Alfarate, Alfaratejo, ktp. al kiuj li ofertas bazan kurson de Esperanto. En venontan bultenon mi informos pri ĉi evento kaj la ceteraj.



VIZITO DE NIA PREZIDANTO AL DIVERSAJ KLUBOJ DE HISPANIO



Dum pasintaj monatoj, kaj profitante diversajn vojaĝojn, la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, havis la ŝancon viziti la lokan movadon en diversaj urboj, kaj renkonti la tieajn samideanojn.

La 23-an de majo li vizitis Malagon, kie li renkontiĝis kun grupo de lokaj samideanoj en la kafejo Esperanto, situanta en la samnoma strato, kie oni gustumis bongunstan ĉokoladon kun “hispanaj churros”. Ni profitis la okazon viziti la estontan Avenuon

“Ludoviko Zamenhof, kreinto de Esperanto”, kies nova nomo, ni petis al la Departamento pri Kulturo de la urbodomo, sed ankoraŭ ni daŭre atendas respondon. Li ankaŭ donacis, Nome de HEF, kelkajn librojn al nia Asocio.


La 27-an de junio venis la vico de Valencio. La HEF-prezidanto kunvenis kun kelkaj valenciaj esperantistoj en la sidejo de la tiea grupo. Oni parolis pri la stato de la grupo, la venontaj kursoj, la ebleco kunlabori kun aliaj grupoj en la valencia regiono, la planoj por ekspozicio pri Esperanto, profitante la panelojn de HEF.



La jaŭdon, 27-an de septembro, la renkonto okazis en la sidejo de la grupo de Bilbao. Estis komentite ankaŭ la nuna stato kaj perspektivoj de la grupo, kaj diversaj estontaj planoj. Oni ankaŭ parolis pri ĵusaj problemoj kun grupo de samideanoj, membroj de kooperativo, kiuj volis partopreni la vivon de la grupo, en maniero kiu kaŭzis miskomprenojn, kaj la manieroj mildigi la

konflikton, respektante la apartajn interesojn de ĉiuj. La grupo interesiĝis ankaŭ pri la ebleco okazigi estonte hispanan kongreson en la provinco, kaj pri aliaj venontaj celebradoj pri kiuj eblas informi en proksima okazo.

La Redakcio



LA URBESTRARO SUBVENCIIIS MADRIDAN ESPERANTO-LICEON

Madrida Esperanto-Liceo petis subvencion komence de la jaro al la Urbestraro por projekto por la festado de la 125-a datreveno de Esperanto, kaj tiu instanco aprobis ĝin. Tiu projekto konsistos el ekspozicio pri Esperanto kaj celebrado de simpozio pri la valoro de Esperanto kiel interkultura fenomeno, ambaŭ aferoj farotaj en la *Centro Dotacional Integrado* de la distrikto de Arganzuela, ĝuste la sama loko kie ni faris ion tian en aprilo 2009, strato Canarias (antikva Estación Sur de Autobuses, apud la metrostacio Palos de la Frontera).

Krome, ni ricevos subvencion por aĉetado de skanilo. La precizaj kvantoj estas: 250 € por la skanilo plus 507 € por elspezoj ligataj al projekto ESPERANTO125.

EKSPOZICIO EN MADRIDO

Inter la 1-a kaj 14-a de marto, MEL organizis ekspozicion pri Esperanto en la Kultura Centro Buenavista de Madrido, pere de la paneloj kreitaj de HEF okaze de la 150a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Ankaŭ okazis prelego lunde la 5-an de marto, fare de Toño del Barrio, kun rimarkinda ĉeesto de interesiĝintoj, plejparte maturaĝaj.

APERIS NOVA ESPERANTO – GRUPO

Fondiĝis formale la Grupo Esperanto – Albacete "Bonifacio Sotos Ochando" (EA-BSO), honore al Bonifacio Sotos Ochando, kiu skizis gramatikon pri Universala Lingvo en 1851 (36 jarojn antaŭ la publikigo de la "Unua Libro" pri Esperanto). La grupo estas provinca kaj apartenas volonte al EMAs kaj, do, al HEF. En sia prezentado la grupo emfazis ke estus granda ĝojo por ili kontakti kaj kunlabori kun aliaj grupoj kaj asocioj pri Esperanto.

Oni povas kontakti kun la grupo per la jenaj iloj: en Tuenti: serĉante "Esperanto Albacete". En Facebook: <http://www.facebook.com/esperantoAB>. En Twitter: [@EsperantoAB](https://twitter.com/EsperantoAB). Ĝia blogo estas: <http://esperantoalbacete.blogspot.com>

esperanto

un planeta por descubrir...

...una lengua para hacerlo

EXPOSICIÓN

ESPERANTO 125 1887-2012

Centro Cultural Buenavista

Avenida de los Toreros nº 5
(distrito Salamanca)

del 1 al 14 de marzo 2012

<http://www.esperanto.es>

OPINIO

La angla, ĉu lingvo aŭ varo?

Troviĝas ĉe la amasmedioj la ideo, ke ne estas eble promociiĝi en la profesia vivo, eĉ ne antaŭeniri en la akademia persona disvolviĝo, se oni ne regas la anglan lingvon. Ĉi tiujn, kaj multajn similajn frazojn, diskonigas ĉefe tiuj celantaj instrui tiun lingvon. Do, unue oni starigas la neceson kaj poste oni ofertas la solvon. Tamen, kiel asertis Leonard Organ, respondeculo pri diverslingvismo en la Eŭropa Unio, la lingvo de la internacia komerco ne estas la angla, sed ĉiuj lingvoj. Ĉi tiu neceso lerni la anglan lingvon, laŭ ĉiuj opinioj, baziĝas sur la neceso disponi pri komunikilo komuna al ĉiuj personoj kun malsimilaj lingvoj. Kaj tiun rolon, laŭdire, ludas la angla lingvo, malgraŭ la fakto, ke multaj ŝtatoj kaj unuopuloj ne simpatias la plej potencajn anglalingvajn ŝtatojn, ĉu pro ĝia koloniema pasinteco, ĉu pro ĝia orgojla ekonomia superinfluo. Tiu lingva aroganteco de la plej gravaj anglalingvaj ŝtatoj, nome Britio kaj Usono, favorigas, ke iliaj registaroj proponas sendiskute, ke la cetera mondo nepre devas regi la anglan lingvon se oni deziras partopreni en la ekonomia aŭ politika internacia vivo, sed ili ne necese devas lerni aliajn idiomojn. Tiel, la lernado de eksterlanda lingvo komenciĝas en Britio je la 11-a vivojaro, tamen en preskaŭ ĉiuj aliaj eŭropaj landoj la lernado de la angla lingvo komenciĝas jam dum la plej malsuperaj infanaj kursoj, kaj en Hispanio eĉ oni favorigas la kreadon de dulingvaj lernejoj, kompreneble tiu dulingveco temas pri la angla kaj la hispana lingvoj.

Laŭ aserto de Noam Chomsky, tiuj ekonomiaj kialoj estas maskitaj de sindonema oferto helpi la plej maldisvolviĝintajn landojn, kaj la promeso atingi ilian prosperon kaj tiel ilian plenan partoprenon en la internacia komerco. Tio estas, temus pri simpla oferto: lernu mian lingvon kaj vi havos la eblecon komerci kaj poste enriĉiĝi. Do, la disvastigo de la angla lingvo verdire baziĝas sur la promeso ĝui la profitojn de la internacia komerco. Sed tio kio vere okazas, laŭ Robert Phillipson diras, en sia verko *Linguistic Imperialism*, estas la fakto, ke la instruado de la angla lingvo en la tuta mondo permanentigas nov-imperiismon, ĉar pere de tiu disvastigo oni helpas internacian komercon kie la centraj anglalingvaj ŝtatoj avantaĝas kaj enriĉiĝas pli kaj plie, dum la periferiaj ŝtatoj, tiuj ne anglalingvaj, malavantaĝas.

Ĉi tiu situacio tute similas al la kolonia epoko de la 19-a kaj 20-a jarcentoj, kiam la koloniantoj favorigis la lernadon de sia lingvo ĉe la koloniata malplimulto, kun la promeso promocii ĝian akademian nivelon kaj partopreni dank'al tio, en la administracio de la kolonio. Do, okaze de la pasintjarcenta koloniismo lerni la anglan lingvon ebligis la atingon de pli alta socia rango. Nuntempe, kiam la koloniismo malaperis, la nov-koloniismo ofertas, kontraŭ la lernado de la angla lingvo, partopreni sukcese en la internacia ekonomio kaj komerco. Neniu entrepreno povas ekonomie sukcesi se ĝi ne disvolvigas sian agadon en la angla lingvo, jen reklamo ĉie legata. Do, temas pri ideologia persvado oferanta, se oni uzas la anglan lingvon, ĝui triumfantan kapitalismon,

ĝian sciencon kaj teknologion dank' al unulingva kompreno de la nuntempa internacia komerco, kie laŭvide ekzistas ununura lingvo: la angla, kaj la ceteraj superfluas. Antaŭ ĉi ĉio, ĉu ekzistas ia reakcio? Tute ne, preskaŭ neniu kontraŭ agado stariĝas. Ni akceptas tiun superecon de la angla lingvo kun la deziro, ke ni mem kaj ĉefe nia idaro ne restu malantaŭe. La socio ne dubas pri tiu neceso regi la anglan lingvon, eĉ tiuj kritikantoj de la nov-koloniisma politiko de la anglalingvaj ŝtatoj aŭ de la aroganteco de ĝia lingva politiko, neniel proponas alian solvon kontakti kun eksterlandanoj aŭ koni aliajn ŝtatojn malsimila al la uzado de la angla lingvo. Tiel, oni kritikis militajn invadojn de Usono aŭ la influo de bankoj kaj entreprenoj de tiu ŝtato en la tuta mondo, tamen neniu kritikis unu el la ĉefaj iloj de tiu aĉa influo: la disvastigo de nacia lingvo pretendanta esti internacia. Vidu, antaŭ kelkaj semajnoj aperis ĉe la amasmedioj reprezentanto de la Centra Eŭropa Banko, li kritikis la usonajn agentejojn kiuj taksas la debitojn de eŭropaj ŝtatoj kaj li tion faris en la angla lingvo, malgraŭ la fakto, ke li ne estis britio nek Britio estas membro de tiu banko. Do, oni kritikis la fian agadon de usona agentejo, tamen oni uzis la anglan lingvon por fari tion.

Alia pruvo pri la konsidero de la instruado de la angla lingvo kiel varo, estas la fakto, ke kelkaj landoj koloniitaj de Britio, sed kun propra nacia lingvo, ofertas amase kursojn de la angla lingvo kaj tio eĉ estas grava motoro de ĝia nacia ekonomio.

Ekzemple Irlando, kiu suferis sovaĝan koloniigadon fare de Britio, la irlandaj naciistoj eĉ konsideris la uzadon de sia propra nacia lingvo unu el la plej gravaj faktoroj de la irlandia malkoloniigado kaj malgraŭ tio nuntempe, Irlando ofertas multnombrajn kursojn pri la angla lingvo por eksterlandaj gestudentoj, tiel la instruado de la koloniiganta lingvo reprezentas preskaŭ la 20% de ĝia Brutta Nacia Produkto. Same Malto, kie malgraŭ la fakto ke la britoj estis dum malpli ol 200 jaroj, posedas propran lingvon kaj historie la maltanoj uzis amase ankaŭ la italan, nuntempe, lerni la anglan lingvon en Malto estas normala afero por studentoj de la mediteraneaj landoj, inter ili Hispanio. Do, la instruado de la angla lingvo estas plia varo, simila al turismo, al la produktado de energio, al la elaborado de manufakturejoj, ktp. Reale temas pri alia varo por la nacia ekonomia sektoro de tiuj ŝtatoj kiuj havas tiun lingvon kiel nacian.

Tiel, la angla lingvo estas varo, ja valora varo. Ne estas eble koni kio okazos post kelkaj jardekoj. Ĉar varo povas konservi sian valoron aŭ tute perdi ĝin. Eble pro tio, multaj lingvaj stud-centroj konsideras nuntempe pli alloga oferi kursojn, ekzemple, pri la germana lingvo, ĉefe pro la fakto, ke Germanio estas lando kie, supozeble, estas pli facile trovi labor-postenojn por hispanaj universitatoj aŭ laboristoj. Do, tiu kiuj ĝis nun gajnis monon pro la instruado de la angla lingvo, lingvo necesa kaj nepara por la persona disvolviĝo, laŭ aserto de reklamoj, ankaŭ vetas favore al la instruado de aliaj lingvoj, kiuj eble ankaŭ estos necesaj kaj nepraj estontece. Sendube, la afero ne estas instrui lingvon, sed atingi monon, hodiaŭ atingata dank' al la angla, morgaŭ *chi lo sá?* (kiu tion scias?)

José María Rodríguez

Lokaj lingvoj, tutteraj lingvoj!

La 10an de februaro en Híjar (Teruel) okazis prelego titolita "Lenguas locales, lenguas globales" ("Lokaj lingvoj, tutteraj lingvoj"). Oni parolis pri la aragona lingvo kaj pri esperanto. La organizinto "Centro de Estudios del Bajo Martín" petis al la aragona E-societo "Fratego" interveni por paroli pri esperanto. Oni respondis al la invito kaj ĉeestis Lorenzo Noguero (prezidanto de "Fratego") kaj la brazila esperantistino Eunice Alberto, kunigitaj per Esperanto kaj Amo (bona ekzemplo pri la viveco de Esperanto).



La preleganto pri aragona lingvo faris propagandeman prelegon pere de interesa "pps"-prezentado en "power point". Poste Lorenzo Noguero parolis pri esperanto helpe per "pps" ("paperoj por sugestoj"), per likva elemento (ĉampanaj bobeloj por gajigi la partoprenantojn) kaj per la ĉeesto de lia ama(n)tino kiu akompanis lin.

Eĉ kurioze, danke al tiu evento iu esperantisto rapide faris en vikipedio esperantan version de la vilaĝo "Ihar" ĵus antaŭ la prelego.

La vetero ekstera estis tre malvarma. Tamen alvenis sufiĉe kontentiga nombro da partoprenantoj. Eĉ demandoj kaj intereso estis konsiderindaj. Iu interesiĝis pri José Ezquerro, blindulo naskiĝinta en proksima vilaĝo Vinaceite (Teruel), kaj fama koncerne al Esperanto-movado kaj al Nacia Organizo pri blinduloj.

Resume, tre agrabla sperto. En lokoj kie kutime aŭdiĝas tamburoj (ja ni aŭdis ilin de praktikantoj por la Sankta Semajno) reeŭhis esperantaj sonoj.

Lorenzo Noguero

A poster for a colloquium event. The title is "Charla Coloquio" in a stylized font, with "Lenguas Locales" and "Lenguas Globales" in a bold, sans-serif font below it, enclosed in a dashed rectangular border. Below the title, it says "Interesante charla sobre el esperanto y el Aragones." The date and time are "Viernes 10 de febrero de 2012" and "Hora: a las 20:30 horas." The location is "Lugar: Salón de plenos del Ayuntamiento de Híjar." The speakers are listed as "Ponentes: Lorenzo Noguero, Presidente de la asociación de esperanto 'Fratego', Alejandro Muñoz Casas, del Ligo de Fobros de Zaragoza." The organizer is "Organiza: Centro de Estudios del Bajo Martín" with a logo consisting of the letters 'ce' in a stylized font.

INFORMOJ DE FUNDACIÓN ESPE- RANTO



FUNDACIÓN
ESPERANTO

Fundación Esperanto decidis apogi dum ĉi tiu jaro la E-instruadon en hispanamerikaj landoj per sendado de E-libroj (lerno-libroj kaj vortaroj). Sed ĝis nun, ni ne ricevis multe da petoj tiucele.

Tial, ni anoncas ke E-grupoj en Hispanio povas sendi al ni proponojn pri ekonomiaj helpoj koncerne al instruado kaj disvastigado de Esperanto. Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj, plibonigo de sidejo... Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj (kun dokumenta memorando) devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2012 (kun indiko de banka konto por eventuala sendado de monhelpo). Oni helpos aktivaĵojn jam faritajn aŭ faratajn antaŭ la limdato.

Poŝt-adreso: Fundación Esperanto. Calle Cadena, 20. 50009-Zaragoza.

E-adresoj:

Direktoro: mpancorbo@gmail.com,

Sekretario: lorenzoesperanto@yahoo.es

FUNEBRE

Nome de mia familio, mi sciigas vin ke mia patro, **Manuel López Serna**, mortis pasintan dimanĉon la 9-an de ĉi tiu monato. Li jam estis tre aĝa (preskaŭ 95-jara) kaj, kvankam li suferis de antaŭ kelkaj jaroj la Alzheimer-malsanon, li pli-malpli bonfartis. Tute simple li mortis pro maljuneco, tute trankvile kaj sendolere, ĉe ni, ĉirkaŭita de sia familio: mia panjo, miaj gefratoj, nevoj, nepoj kaj eĉ pranepoj. Li estis bona homo kaj bona esperantisto. Li esperantiĝis en sia juneco en la loka E-grupo de Callosa de Segura (Alicante), nia naskiĝurbo, kaj membriĝis en HEF jam de la unuaj momentoj kun la HEF-numero 43. Ĉe ni, li ĉiam aplikis la rektan metodon, t.e. li ĉiam alparolis siajn gefilojn en esperanto, tial mi kaj miaj gefratoj estas denaskaj esperantistoj. Li gvidis multajn E-kursojn, en nia naskiĝurbo kaj en Alicante, kien la familio translokiĝis pro laboraj kialoj. Tie en Alicante li apartenis al la loka kongresa komitato, kiu organizis la HEF-kongreson en la monato julio de la jaro 1971-a. Dum multaj jaroj li kaj mia panjo (Concha) partoprenis multajn E-kongresojn kaj renkontiĝojn. Kiel bona esperantisto li estis amiko de la monda interkompreniĝo kaj solidareco inter ĉiuj homoj. Li estis ankaŭ dum sia tuta vivo simpla kaj honesta laboristo, kiu revis atingi mondon pli justan, fratecan kaj liberan. Li apartenis al SAT dum kelkaj jaroj en la 50-aj jaroj de pasinta jarcento, eĉ li estis dum kelka tempo landa peranto.

Al li ŝuldas mia familio nian esperantistecan kaj la ĵus cititajn idealojn.

Amike vin salutas lia filo, **Manuel López Hernández**

Ankaŭ, nia samideano Rodolfo Canet Martín sendis noto pri la forpaso de Manuel Lopez Serna, kiu estas jena:

Kun malĝojo mi sciigas vin la forpason de nia kara Manuel López Serna, naskita en Callosa del Segura (Alakanto), la jaro 1.919 kaj forpasis en Rafal (urbeto proksime de Callosa) la 09an. Septembro nuna jaro. Unu el la plej konsiderindaj personecoj de nia esperanta movado. Li esperantiĝis en 1936, pasia batalanto por nia afero. Li ankaŭ esperantiĝis al tuta sia familio, de la edzino ĝis la gefiloj esperantigitaj denaske. Li estis SAT-peranto en Hispanio de 1.952 ĝis 1.957. Dum la postmilitaj jaroj, li multe strebis por oficialigi Esperanton en lia urbo. Poste li instaligis al mia urbo Alakanto pro profesiaj motivoj, kaj li fervore aktivadis sindona kaj ĉiufanka aganto por la Internacia Lingvo, precisa kaj akurata, fulmorapida en sia laboro, restos en daŭra rememoro pro siaj grandaj meritoj por Esperanto. De sia alveno ĝis sia emeriteco ĉiam estis estrarano

de nia Grupo de Alakanto, kaj en la jaro 1.971 brilis kiel organizanto de nia 31^a HEF-Kongreso okazinta en Alakanto.

Diference de multaj, kiuj post rapida ekbrilo en nia movado tuj estingiĝis, daŭre aktivis en la plej diversaj funkcioj, kaj gvidis multajn Esperanto-Kursojn en Callosa kaj Alakanto. Oni povas diri, ke li restis fidela al Zamenhofaj idealoj de la juneco ĝis sia lasta spiro, malgraŭ lia malsano de antaŭ kelkaj jaroj. Nia Grupo de Alakanto respektoplene kliniĝas antaŭ la elstara figuro de samideano Manuel López Serna, kaj la tuta familio akceptu la plej profundajn kaj sincerajn kondolecojn de la esperanta-familio.

Rodolfo Martín Canet

Forpasis Enrique Piquero Vazquez

Kun profunda doloro mi informas al niaj gesamideanoj pri la forpaso la 23an de Aŭgusto de la veterana esperantisto kaj bona amiko, Enrique Piquero Vazquez.

S-ano Piquero estis dum longaj jaroj aktiva esperantisto: kunfondinto de "Fundación Esperanto" kaj dum multaj jaroj sekretario de tiu Fondaĵo; komitatano de "Frateco" de Zaragozo kaj membro ĉiam preta por aktivi en nia Movado. Memore al li, ni dediĉas al li jenan poemeton:

Al mia amiko Enrique Piquero.-

En mia kor' dolore sentis
kiam la scio al mi venis
pri la forpaso de amiko mia,
krom amiko, esperantista,
kiun mi alte, tre alte estimis
dum longaj jaroj kunvivintaj.

Estis mia amik' Piquero
homo honesta kaj laborema,
li vivigis nian "Fundacion"
per trafaj demarŝoj lertaj
kiuj subtenis niajn financojn
de Asoci' kun esenc' idealisma.

Jen do, tri gravaj motivoj
por valorigi nian estimon:
unue, nian esperantistecon,
due, lian financ-talenton
kaj super tiuj allogoj
nia tre, tre bona amikeco...

Amik' Enrique,
vi restas ĉiam ĉe ni interne,
en la profundo de nia koro,
nia estimo al vi por eterne!!

Antonio Marco Botella
Zaragozo, aŭgusto 2.012.



FRATECO
Asociación Aragonesa
de Esperanto
Esperanto-Asocio en Aragono



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

72ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
72º CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO



Lingvo kaj Sentoj
Lengua y Sentimiento

EKA INFORMO PRI LA PROKSIMA HEK 72-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO ZARAGOZO, de 3-a al 5-a de majo 2013

LA KONGRESO

“FRATECO”, Aragona Esperanto-Asocio, en kunlaboro kun Hispana Esperanto-Federacio, invitas vin al la partopreno en la 72-a Hispana Kongreso de Esperanto kiu okazos de la 3-a (vendrede) al la 5-a de majo (dimanĉe) de la jaro 2013 en la urbo Zaragozo.

LA KONGRES-TEMO / MOT(IV)O

“Lingvo kaj sentoj”, jen nia kongresa devizo. La kongreso havos kiel bazan mot(iv)on la difinon esprimatan de K. Kalocsay por karakterizi nian idiomon: “Lingvo kaj sentoj. Jen estas Esperanto”.

LA KONGRESEJO

La baza sidejo de la kongreso estos salono en hotelo (nome: Hotel Goya), kies adreso situas en strato (calle 5 de marzo, 5) je la centro de la urbo (apud: plaza de España kaj avenida Independencia).

Ni povos same disponi de la propra sidejo de la asocio kiu situas en strato calle de la Cadena, 20, 1º izda.

LA PROGRAMO

La programo ankoraŭ devas esti pretigata de la Organiza Komitato, HEF... kaj E vi mem... kiu povas sugesti ian proponon. Antaŭvidataj estas, prelegoj, distraĵoj kaj vizitoj (al palaco “Aljaferia”).

Ni volas profiti por omaĝi la verkon Donkiĥoton kaj la esperantan tradukon faritan de Fernando de Diego.

LA KONGRES-ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto: Eduardo Berdor

Vicprezidanto: Antonio Marco

Sekretario kaj kasisto: Lorenzo Noguero

Aliaj kunlaborantoj: Enrique Navarro, Miguel Ángel Martín, Sabino Pelegrín

LA URBO

Zaragozo (hispane Zaragoza) estas vojkruclo (laŭ geografia kaj historia vidpunktoj) kun iberoj, romianoj, araboj, kristanoj... kaj esperantistoj... Indas viziti famaj monumentoj (preĝejo-baziliko “El Pilar”, palaco “Aljaferia”...).

ALIĜILO

Plenumu tiun ĉi aliĝilon, kaj komuniku ĝin al la asocio FRATECO en Zaragozo. Oni povas sendi ĝin (aŭ simple la datenojn) per e-mesaĝo al fratecoesperanto@yahoo.es aŭ al fizika adreso de la asocio: Asociación de esperanto FRATECO. Calle Cadena, 20, 1ª izda. 50001-Zaragoza (Hispanio)

PERSONA NOMOFAMILIA(J) NOMO
(J).....
ADRESO
.....
URBO.....(. .. .)
LANDO.....
RETADRESO.....
TELEFONNUMEROJ)
MEMBRO DE HEF Jes Ne NASKIĜDATO (nedevice, nur por
statistiko aŭ rabato)
ALIAJ RABATOJ.....
DATO DE PAGO..... MANIERO DE PAGO.....
KOTIZO.....
ALIAJ.....
DONACO.....
SUMO.....

Pagu la kotizon en jena bankokonto indikante la tekston "Kongreso" kaj vian nomon en la bankokonto de la Asociación Aragonesa de Esperanto "FRATECO": Ibercaja: 2085 0108 15 01 023865 80 (se vi estas en Hispanio)

KOTIZOJ	Aliĝo ĝis la 31a de januaro ⁽¹⁾	De la 1a de februaro ĝis la 31a de marto ⁽¹⁾	Post la 31a de marto kaj surloka aliĝo
Membro de HEF aŭ FRATECO	35€	45€	55€
Ne membro de HEF	45€	55€	65€
Juna membro de HEF (malpli ol 30) ⁽²⁾	25€	35€	45€
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30€	40€	50€

Por pagi eksterlande bv. uzi jenan kodon: IBAN: ES46 2085 0108 15 01 02386580 // SWIFT: CAZRES2Z
(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.(2) Sama rabato estas aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aligitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2012 kaj aprilo 2013

ESPAÑA A
TU SELLO CORREOS

ESPERANTO



1887-2012

JARUJN FALĜEANTA LINDUJN

71a Hispana Kongreso de Esperanto.
Almagro, 2012